

Pri la svisa neŭtraleco, III.
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1991.12.26 & 28

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

La pasintan semajnon ni raportis pri la naskiĝo de la nocio de la svisa neŭtraleco en la komenco de la 15-a jarcento. En la civito Zug konfliktis la urbaj familioj kun la kamparanaj komunumoj. La kunekzistado de aristokrata kaj demokrata reĝimoj ne estis facila. La Schwyz'aj kamparanoj ne observante la pakton, kiu malpermesas intervenon en la aferojn de la ceteraj federitaj civitoj, iris armee helpi al la Zug'aj kamparanoj, sed la Dieto de la Svisa Ligo tuj intervenis. Per arbitraciado solviĝis tiu konflikto, kiu instruis, ke federismo signifas absolutan rezignon pri la volo al potenco kaj al regado super la ceteraj ligoj profite al la volo pri solidareco. Alia tia konflikto inter la demokrataj kamparanoj de Appenzell kaj la abato de Sankt-Gallen plifirmigis tiun nocion de neŭtraleco. Pli kaj pli sentiĝis la bezono, ke inter la federitoj unu civito sin pretigu por ludi la rolon de arbitracianto. Al la Appenzell'anoj estis trudita tiu rolo, kiam ili eniris la Svisan Ligon. Jen kiel esprimiĝis tiu nocio de neŭtraleco:

A.- "Ni, Appenzell'anoj, okaze de konflikto en la Ligo, neniam rajtos alporti ian ajn helpon al iu aŭ alia partio, escepte se estas per delegado de civitanoj fake kompetentaj por provi restarigi la konkordon."

Cl.- Hodiaŭ ni raportu, kiel en la dekkvina jarcento alispeca konflikto kondukis al nova malkovro, la egaleco de la neegaluloj.

A.- Inter la teritorioj de Appenzell kaj de Schwyz regadis la grafo de Toggenburg. Tiu ĉi grafo mortis sen lasi rektajn heredantojn. Pro tio li heredigis parton de sia teritorio al la civito Schwyz. Sed la civito Zürich ne akceptis tiun ĉi fakton. Al la civitanoj de Schwyz, kiuj aneksis la Valon Toggenburg, la urbo Zürich fermis sian merkaton.

Cl.- Schwyz tuj petis arbitracion. Sed la urbestro de Zürich, kiu estis nobelo, ne akceptis kunsidi kun kamparana landestro demokrate elektita. La konflikto inter la aristokratismo kaj demokratismo prenis novan formon. La Dieto avertis, ke normalaj rilatoj inter Zürich kaj Schwyz tuj devas esti restarigitaj, kaj ke la civito, kiu ne obeos al tiu decido, estos konsiderata kiel kulpulo.

A.- Zürich rifuzis obei tiun ĉi averton. Unuanime la demokrataj kaj la aristokrataj civitoj apogis la ŝtaton Schwyz, deklarante militon al Zürich. Dum dek jaroj regis terura milito ĉefe ruiniga por la kamparanoj. Dum la vilaĝoj brulis, Zürich alvokis la helpon de la Habsburga imperiestro Frederiko tria. Tio signifis unuflankan ekŝiĝon el la pakto, kio jure ne estis ebla.

Cl.- La imperiestro profitis la okazon por internaciigi la konflikton. Li alvokis la helpon de la franca reĝo Karlo la sepa, kiu sendis trupojn. La svisa armeo estis venkita de la franca armeo. Por eviti francan okupadon la urbo Zürich decidis forlasi la armilojn por reveni al perarbitracia solvo de la konflikto.

A.- Estas konstanta fakto en la svisa historio, ke okaze de eksteraj intervenoj interrompiĝas la internaj disputoj de la svisoj.

Cl.- La arbitraciado kulpigis la civiton Zürich. Sed ĝi kondukis al la malkovro de nova principo. La principo de la jura egaleco de la neegaluloj.

A.- En federacia ligo kiel la svisa:

Cl.- Urba civito jure egalas al kamparana civito.

A.- Aristokrata civito jure egalas al demokrata civito.

Cl.- Granda civito jure egalas al malgranda civito.

A.- Riĉa civito jure egalas al malriĉa civito.

Cl.- Nek la politika reĝimo, nek la nombro de la loĝantoj, nek la teritoria vasteco, nek la ekonomia forto rajtas influi tiun juran egalecon.

A.- Tio estis nova kontraŭstaro al natura determinismo, kiu volas, ke la plej forta regadu la aliajn.

Cl.- La franca revolucio proklamas la principon de la egaleco de la individuoj kaj la dudeka jarcento tiun de la egaleco de la viroj kaj inoj. Tiujn du malkovrojn malfacile akceptos la civitanoj de la svisaj ŝtatoj kun **Landgemeinde**-demokrateco.

A.- La grava konflikto kun Zürich meze de la dekkvina jarcento ankaŭ instruis, ke ĉiu konflikto necese finiĝas per arbitracio. Do, kial uzi perforton, se post la uzo de la armiloj oni tamen devos kunsidi por diskuti? En la Svisa Ligo pli kaj pli la kverelantoj tuj akceptos sin submeti al arbitraciaj tribunaloj, kies funkciado iom post iom perfektigis.

Cl.- Dum la dekkvina jarcento la Svisa Ligo konis novan teritorian ekspansion. En la okcidenta parto de la nuna Svislando troviĝis vastaj teritorioj, kiuj apartenis al la dukoj de Savojo kaj de Burgundlando. Tiuj teritorioj estas iom post iom konkerataj, sed ili ne formas novajn ŝtatojn. Ili formas koloniojn, kiujn administras je sia profito la konkerintoj. Sude armeoj transiras la alpajn pasejojn por konkeri aliajn teritoriojn en Lombardio. Sed la okŝtata Ligo ne kapablas havi koheran konker-politikon. Ĉiu ŝtato havas propran sintenon kaj tio kondukas al malvenkoj sude de Alparo. Estas en ĉi tiu tempo, ke el la vilaĝo Flue aŭdiĝas la konsiloj de la ermito Nikolao. Antaŭ ol esti ermito, Nikolao plenumis la rolon de vilaĝestro. Li komprenigas al la Dietanoj, ke pro manko de centra povo la Svisa Ligo ne estas farita por militaj konkeroj.

A.- Dankal liaj saĝaj konsiloj la Svisa Ligo trovos novan ekvilibron asimilante 5 novajn ŝtatojn. Ekde 1513 ĝis la Bonaparta invado franca, Svislando restos 13-Ŝtata Ligo. Inter la novaj ŝtatoj la civitoj Appenzell kaj Basel ricevis la juran devon resti neŭtralaj okaze de intercivitaj konfliktoj.

Cl.- Tiu kvietiĝo, kiun la svisoj ŝuldas al la saĝo de Nikolao de Flue kaj al la praktikado de arbitraciaj principoj, helpas al la svisa federismo travivi sian plej malfacilan krizon. En la 16-a jarcento naskiĝas nova spirito, kiun ni nomu intercivitismo. La ekzisto de Svislando ekkonkretiĝas en intercivitanaj konkursoj. Tiuj intercivitanaj gimnastikaj festoj pensigas al la hodiaŭaj internaciaj sportaj olimpiadoj.

A.- Oni rajtas fari ian paralelismojn inter Svislando en la 16-a jarcento kaj Eŭropo en la 20-a jarcento.

Cl.- Interne de la Ligo ĉiu vidas antaŭ ĉio la apartenon al la propra lando. Ili estas Schwyz'anoj, Bern'anoj, Appenzell'anoj. La sento esti sviso ne ekzistas.

A.- La Ŝtatoj formas inter si komplikajn aliancojn kaj ekzistas koloniaj teritorioj.

Cl.- Ĉiu ŝtato havas propran juran sistemon. Eĉ ne komuna mono ekzistas.

A.- Regas lingva diverseco. En ĉiu ŝtato la alemana lingvo havas propran evoluon kaj en okcidento estas parolata la franca kaj en la sudo la itala.

Cl.- Sed el la ekstero oni rimarkas komunajn trajtojn, kaj la svisoj mem, kiam ili forlasas la Ligon por soldat-deĵori profite al fremdaj potencoj aŭ por komerci, sentas tiujn ĉi komunajn trajtojn, same kiel hodiaŭ eŭropanoj ĉefe konscias pri sia eŭropaneco, kiam ili forlasas sian peninsulon aŭ estas konfrontataj kun aliaj civilizoj. Interne de Eŭropo, ili estas antaŭ ĉio anoj de preciza nacio. Sed estas fakto, ke dum la dudek pasintaj jaroj la eŭropaneco kreskis. Nia junularo pensas pli kaj pli eŭropanece. Simila evoluo distingis la generaciojn en la Svisa Ligo.

A.- Kiel ni jam anoncis en la pasintaj elsendoj, ni kopiigos sur kasedo nian prelegaron pri la disvolviĝo de la nocio de la svisa neŭtraleco. Tiun kasedon interesatoj povos mendi al Svisa Radio Internacia.

Cl.- Claude kaj Andree Gacond diras al siaj karaj aŭskultantoj: Ĝis reaŭdo kaj bonan novan jaron!